

La 8-an de Septembro 1920

Estimata samideano,

dankon, grandan dankon por via ŝatuida & interesa letero de la 1-a t.m., kiu alvenis al mi hieraŭ matene.

Mi ĝojas ke mia letero al vi ne havis la saman sorton ol miaj leteroj al aliaj

Bohemanoj=neniun respondon. Mi dankas vin pro la rapideco de via reskondo. Ĉio en via letero interesas min. Mi bone vidas ke vi estas tre okupata homo pri Esperanto & mi multe admiras vin. Bedaŭrinde mi ne povas plu multe fari por Esperanto en Boulogne. Oni jam antaŭ longe faris ĉion kio estis ebla. Nun, la milito detruis la klopodojn intelektajn & la plimulto de la ĝenerala publiko pli ŝatas peni & elspezi por amuzaĵoj: dancado,, k. t. p. Unue, kiel ĉie, estas precele la manlaboristoj kiuj kopias altajn salajrojn & poste elspezas ĉion kion ili gajnis. La [intelektaj](#) profesioj [igas](#) la novajn malriĉulojn. Do, vi vidas ke Esperanto ne povas plene sukcesi en la nuna momento. Kvankam estas multaj Esperantistoj jen Boulogne. Mi estas fervora al la kara lingvo, sed por mi estas tiel kompreneble. Mi ĉeestis ĉiujn antaŭajn Europajn kongresojn kie mi elektis bonajn amikojn kies nia amata Majstro & kaj familio estis la plejintimaj – kiel mi ĝojas ke vi konis lin – ankaŭ ke vi ĉeestis Kongreson. Ŝajnos ke vi estas jam amiko pro tio. Eble mi vidis vin & parolis kun vi en Bern. Mi estis preskaŭ la tutan tempon kun la familio Zamenhof, do estas tre eble ke vi vidis min. Ĉu vi ĉeestis la ĝeneralan festenon (tagmanĝo) en la Kaznio? Poste oni marŝis ĝis monteto & ĉiuj estis fotografitaj. Ankaŭ mi sidis apud sinjorino Zamenhof. En tiu festem, mi sidis apud D-ro Bruhold?, delegito por Germanio, el Dresdeno, tre fama Esperantisto. Li leviĝis & faris paroladon en la nomo de Germanujo & parolis pri mi (& pro tio mi estis tre ĝenata). Eble vi estis apud mi. Post tiu kongres ni vizitis la lagun italajn, I-kugadnion, & la Svisujon (Zermatt). Mi tre bone konis Svisujon antaŭ. Mi jam vizitis preskaŭ ĉiam per Esperanto: Germanujon, Danujon, Svedujon, [Holandujon](#), Belgujon, [Anglujon](#), Svisujon, Italujon, Hispanujon, vian landon irante la monton Tatrajn. Esperanto doni al mi la plej Belin horojn, preskaŭ en mia vivo.

Mi korespondadis kun D-ro Aleksandro Zamenhof (plej juna frato de la Majstro) dum 5 jaroj ([1911-1916](#)) ĝis lia moro. Li havis belan [reveman](#), [artan](#) inteligentecon. Mi intime konis lin & li venis en nian hejmen dum 15 tagoj. La majstro & familio ankaŭ vizitis nian hejmon. Mi ricevis la lastan semajnon malĝojan leteron de sinjoro Zamenhof petegante min provi havi sciiĵojn pri ŝia.... Sofio de sin. Ŝi ne havis ĉu leteron, ĉu informojn de pli ol.... jarojn!!! Ŝi estis kuracistino en Kh.... Eble ŝi estis mortigita de la Bolŝevikoj. La malfeliĉulino. Ŝi korespondis kun mi dum la milito ĝis 1917 – nenio poste. Mi turnis min al

Mi ne memoras la nomon Schulhof kiel poeto. Eble mi legis ion de li, sed ne memoras. Por ni latinoj viaj nemoj estas tre malfailaj & malafcile memoreblaj.

Mi tre bone trovis vian urbeton Přelouč sur mia angla landkarto. Angle oni nomis ĝin „Przelautsch“. Sed mi ne tre bone komprenos kiel vi povas esti advokato en urebo kie nur estas 4000 anoj. Ĉu vere povas ekzisti Tribunaloj kie vi povas pledi? Eble vi devas vojaĝi multe. Se vi estas advokato nur de vi ne povas, sendube, havi ankoraŭ multe da procesoj. ... en Bologno kiu estas urbo de 55 000 loĝantoj. La „cour: „..... por juĝi la kriminalaj aferoj, & la cour d'appel: la spelacia juĝantaro ne ekzistas, ili ekzistas en apudaj urboj.

Ĉu Vi portas specialajn vestaĵojn kiam vi pledas? Tie, estas longaj roboj kiel la Romanoj portis en antikvaj epokoj, kun antaŭkolumo blanka. Tiu robo estas ornamita de felo blanka

sur la ŝultro & estas tre longa je la maniero de Romanoj. La advokatoj devas pendii la trena.... sur la la brako. Ili portas nigran ĉapon ankaŭ. En, kiel eble vi bone scias, ili portas blankan perukon laŭ la maniero de Ludviko XV.de Francujo.

Mia edzo estas tre okupata – tro – multe tro por lia sano. Li estas la advokato kiu havas la plimulton da aferoj en Boulogno. Mi helpas lin multe en la skribaĵo de aktoroj ktp., sed mi mem havas tre aktivan vivon pro la malbonaj servistoj kiujn oni havas de post la milito. Mi ankaŭ legas multe precipe angle. Mi kudras, mi eliras ĉiutage, mi ludas tenison, mi korespondas, mi okupiĝas multe pri la mastrumado, pri la ĝardeno, mi vidas geamikojn ofte mi ludas ...& „bridge“ (kart-ludo) & ankaŭ mi detaloj kies la ĉiutaga vivo konsistas kiam oni havas grandan domon. Sed malgraŭ la ĉiutagaj, ofte prozaj okupoj, mi ĉiam restas idealistino & revulino & miaj (& mia **miago**? ĉiu momente vagadas. Mi ankaŭ pentras & desegnas. Mi estis en „... des Beano Arts“ (lernejo de BelArtoj) en Londono en 1918-1919, ankaŭ tie-ci, antaŭ kelkaj jaroj. Bedaŭrinde mi ne estas praktikanta muzikistino. Tamen mi amuzas la muzikon – mi ankaŭ kantas sed nur por mi mem. ... estas la pianon aŭ violonon.

Ĉu Vi parolas france & angle? Mi vi certe konas la francan lingvon, ĉu ne? Angle estis mia naskiĝanta lingvo ĉar mi naskiĝis en Londono. Mi venis Francujon knabino, por lerni france. Je la 15-a jaro mi franciĝis & edziniĝis preskaŭ knabino. Estas pro tio ke mi havas grandan filon pli granda ol mi mem. Oni ĉiam pensas ke ni estas gefratoj